

Bulteno de BARCELONA STELO (FILIO DE B. E. S.)

Oficiala Organo de «Barcelona Esperantista Societo»

JARO III.—SUP. DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—APRILLO 1914—N^o 3 (17)

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 • Redaktoro : E. PELLICER

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Grupaj aferoj.* — *Barcelona Esperantista Societo.*

GRUPAJ AFEROJ

— Ekskurson al Font del Lleó en Pedralbes faris 30 el niaj gegrupanoj la 22.^{na} de Marto. Kiel en ĉiuj aliaj, plej kora gajeco regis inter la ekskursantoj, kiuj revenis hejmen tre kontentaj je la agrabla posttagmezo kune pasigita. Fotografajoj, faritaj dum la ekskurso, estas aĉeteblaj en nia sidejo po 15 centimoj ĉiu.

— La prezidanto de la grupo *Frateco*, el Zaragoza, distinginda advokato, S-ro Benigno de Luna, volis favori per sia vizito nian grupon, kiu gastigis lin la 14.^{na} de Aprilo. Ankaŭ li partoprenis en la ekskurso al Terrasa kaj Rubí, kiun ni organizis, el kiu li ĉerpis fortojn por fondi la *Aragona Esperantista Federacio'n*, kiun certe baldaŭ ni povos saluti. Al la komplezema gasto plej koran dankon por liaj afablaĵoj.

BARCELONA ESPERANTISTA SOCIETO

Inaŭgura Festaro

En la sidejo de «*Ciam Antaŭeno*» tre bele ornamita per girlandoj, flagoj esperantaj, k. t. p. kunvenis la 29.^{na} de Marto multaj esperantistoj por ĉeesti al la Konkurso de Legoarto, kiu havis lokon kun kontentiga sukceso. La feston komencis S-ro Grau per esperanta parolado pri la celo de la *Barcelona Esperantista Societo* kaj pri la sinteno rilate al ĝi de la ceteraj grupoj barcelonaj, kiujn li petis volu ekzameni la taskon de la B. E. S. kaj aliĝi al ĝi aŭ montri la aferojn, kiuj povas malpermesi tiun aliĝon. Li diris, ke al la devizo de la unua epoko de Esperanto : *espero, obstino, pacienco* kaj al la vorto *konkordo* por la dua epoko, la esperantistoj B. E. S.-anoj

devas aldoni la vorton *labore*, ne nur por varbi novajn samideanojn, sed ankaŭ por reakiri la malnovajn laciĝintajn kaj tiujn, kiuj eble pro suspektemo kontraŭ personoj estas erarintaj. Fine li glosis iom pri la bonoj, kiujn unueco alportas al ĉiu agado kaj anoncis la komenĉigon de l' konkurso. Multaj aplaŭdoj.

En la konkurso de legoarto partoprenis fraŭlinoj Cortés, Leonor, Pascual kaj Rey, kaj sinjoroj Badia, Brossa, Graells, Guilleumot kaj Iduarte. La Juĝantaro konsistis el S-roj Pujulà, Grau, Pellicer kaj Amades, diplomitaj profesoroj de K. E. F. kaj Renom, Piñol kaj Claramunt, profesoroj ĉe la grupoj *Ĉiam Antaŭen*, *Supren* kaj *Esperanta Racionala*.

La konkursantoj ricevis, kvin minutojn antaŭ sia prezentado al publiko, tekston kvindeklinian el la Krestomatio kaj la belan versaĵon de S-ro Grabowski *La Tagiĝo*, kiujn ili legis antaŭ la ĉeestantoj kaj Juĝantaro. Ankaŭ ili legis versaĵojn laŭvole elektitajn, el kiuj ni aŭdis tre belajn, nome: «La blinda bovino», «Vi kial ne venas», «Amos», «Kanteto», k. c.

La juĝantaro post interkonsilio publikigis la jenan verdikton:

Kvankam la prononcado de la esperantaj tekstoj estis tre korekta, precipe ĉe kelkaj konkursintoj, tamen la legomaniero, — de la vidipunktoj stila kaj emfaza, — de la partoprenintoj malpermesas la aljuĝon de la *unna* premio, kiu estas dividita en tri partojn (premioj 3.^a, 4.^a kaj 5.^a) — *Duan* premion, 10 pesetoj, la juĝantoj unuanime aljuĝas al F-ino Rosa Cortés; *trian*, 5 ptoj., al F-ino Angela Leonor; *kvaran*, 5 ptoj.; al S-ro Palmiro Guilleumot; *kvinan*, 5 ptoj., al S-ro Antoni Graells; *reproduktadojn de la statuso* «Venuso de Milo» al F-ino Enriqueta Pascual kaj *ekzempleron de «La Naivulo»* kiel subpremion al ceteraj konkursintoj, kiujn oni aplaŭdis, kiam ili ricevis la premiojn.

La finan paroladon faris S-ro Pujulà, kiu diris kelkajn ĝustajn vortojn pri danĝere erara agado de kelkaj samideanoj, kiuj intencas peti de la hispana Reĝo, ke la hispana ŝtato petu la aliajn por alpreno de Esperanto, kiel lingvo oficiala en la internaciaj diplomaciaj aferoj; la oratoro rimarkigis, ke eĉ kiam simila peto estus juĝata utila, prudento konsilas paralelan samcelan agadon internacian de ĉiuj esperantaj organizacioj por atingi senrapidecan kaj laŭvolan enkondukon de nia lingvo en ĉiujn sferojn de vivado. Por veni al tiu celo, li rek-mendis konstantan propagandon, kiu diskonigos Esperanton kaj kreos favoran ĝeneralan opinion, fine sin trudontan al la registaroj. La oratoro estis longe aplaŭdata.

S-ro Renom, prezidanto de *C. A.* diris kelkajn dankajn vortojn kaj ĉiuj esperantistoj alestantaj kantis, forironte, nian himnon.

(Daŭros.)